



Svisa Esperanto-Societo

# informas

jaro 2006 numero 5-a: novembro-decembro



Fotis Stefano Keller.

Renato Corsetti

kun Nelly kaj Dietrich Weidmann kaj ties filinoj Jasmin kaj Linda,  
kiuj organizis la Zurikan Orientsvisan Renkonton de la 14-a de oktobro.



# Rememorigilo

## *SES informas*

### Redakcio :

Claude Gacond, Poŝtfako 3034,  
CDELI, Biblioteko de la Urbo,  
CH-2303 La Chaux-de-Fonds

Retpoŝto : [claude.gacond@ne.ch](mailto:claude.gacond@ne.ch)

Tel. : ĉe CDELI : 032 967 68 55  
hejme: 032 926 52 32

Redaktaj kunlaborantoj:

Nancy Fontannaz, Stefano Keller,  
Andreas Künzli, Richard  
Schneller

## *SES informas*

### Redaktaj datlimoj

2007-1: januaro-marto:  
marte 25.

2007-2: aprilo-junio:  
maje 25.

2007-3 : julio-septembro :  
julie 15.

2007-4: oktobro-decembro:  
oktobre 15.

**Konsultu la retejon de SES !**

[www.esperan.to/ses](http://www.esperan.to/ses)

## SES-estraro

Mireille Grosjean, kunprezidanto,  
Grand-Rue 9, 2416 Les Brenets. Tel. :  
032 932 18 88.

Retpoŝto : [mireille-grosjean@rpn.ch](mailto:mireille-grosjean@rpn.ch)

Dietrich Weidmann, kunprezidanto, PF  
301, 8034 Zürich. Tel.: 044 251 50 25.  
Retpoŝto: [info@esperanto.ch](mailto:info@esperanto.ch)

Stefano Keller, sekretario, CP 6034,  
1002 Lausanne. Tel.: 079 612 75 79.  
Retpoŝto: [stefano.keller@kontakto.info](mailto:stefano.keller@kontakto.info)

Hans-Werner Grossmann, kasisto,  
Esperanto-Servo, PF 262, 4132  
MuttENZ 1. Tel.: 076 460 89 92.  
Retpoŝto: [esperanto-servo@bluewin.ch](mailto:esperanto-servo@bluewin.ch)

## Poŝta ĉekokonto

17-581908-4

Svisa Esperanto-Societo 2300 La Chaux-de-Fonds

## Kotizoj al SES

Kun ricevado de *SES informas*

Fr. 10	Infanoj	ĝis 18 jaroj
Fr. 20	Junuloj	de 19 ĝis 29 jaroj
Fr. 35	Plenkreskuloj	ekde 30 jaroj
Fr. 50	Paroj	ekde 30 jaroj
Fr. 70	Patronoj	ekde 30 jaroj
Fr. 25	nura abono al <i>SES informas</i>	



# Vivo de SES

## Orientsvisa Esperanto-Kulturrenkonto Zuriko, 2006 oktobro 14-15

Ĉiujn fotojn realigis Stefano Keller



Dum la projekciado de la film « Gerda Malaperis »

Interesa programo kun gravaj prelegoj kunvenigis partoprenantojn en Zuriko, el ĉiuj regionoj de Svislando sabate la 14-an de oktobro.

Projekciado de la antaŭ nelonge aperinta filmo, « Gerda malaperis », bazita sur la samtitola instru-romaneto de Claude Piron, inaŭguris la unuan tagon de la esperanta kulturrenkonto.

Post tiu distra ero, alvenis la momento renkonti la ĉefpreleganton de la evento, s-ron Renato Corsetti. La temo de lia prelego estis « La stato de esperanto en la mondo ».

Analizante la nuntempan situacion de la lingvo internacia, la prezidanto de UEA informis pri faktoj, kiuj elmontris signifajn aktivecojn pri esperanto en



Sudameriko kaj en Afriko. Oni ĝenerale povas konstati, ke en Eŭropo okazas malpli da agadoj, krom la aktivecoj celantaj la politikistojn de Eŭropa Unio. Sed Renato Corsetti atentigis pri la neceso de laboro ĉe la bazo, sen kio la aktiveco ĉe la supro ne povas sukcesi.




« Sen agado ĉe la bazo, ni ne sukcesos ĉe la supro » diras Renato Corsetti



Parto de la atentema askultantaro

Sekve al la informriĉa prezentado de la esperanta mondo, la kunvenintoj daŭrigis la konversaciojn pri la temo

dum la marŝado al la restoracio de la Arta Domo (Kunsthhaus) kaj dum la bongusta tagmanĝo.



Renato Corsetti kaj Dietrich Weidmann gvidas la irantojn al la restoracio.



Tagmanĝo en la Arta Domo



Ĉe la prezidanta tablo :  
Dieter Rooke, Hans-Werner Grossmann,  
Bruno Graf, Renato Corsetti, dorse Dietrich  
Weidmann kaj unu el liaj filinoj.



La posttagmezo komenciĝis kun prelego de Andreas Künzli, kiu prezentis la baldaŭ aperontan Enciklopedion pri Universalaj Lingvoj en Svislando.




Li detaligis la enhavon de sia verko, rakontis pri kuriozaĵoj, kiujn li renkontis dum la redaktado de la pli ol milpaĝa libro. Laŭtleĝo de kelkaj frazoj skribitaj en la ĉapitroj pri diversaj planlingvoj de la antologia parto bone ilustris la amplekson de lia laboro.



La bahaa koruso

Kun varia enhavo, distra programo estis la sekva ero de la renkonto. Bahaa ĥoro de Zuriko prezentis diversajn kantojn en esperanto kaj kunkantigis la publikon. Sekvis premiero de junaj kantistinoj, Linda kaj Jasmin Weidmann, filinoj de la svisgermana prezidento de SES, kiuj sukcese kantis siajn kantojn ĵus aperintaj sur KD.




Jasmin kaj Linda Weidmann, la novaj stelulinoj de la esperanta kanzono.

Vaŭdajn popolkantojn prezentis en Esperanto la Grupo de Etoy, gekantistoj el la regiono inter Laŭzano kaj Ĝenevo.

Antaŭ la daŭrigo de dialogado kun Renato Corsetti, oni povis konatiĝi kun masaĝistino, kiu dum la kunveno proponis siajn sanigajn kaj malstreĉigajn servojn en apuda ejo ekipita tiucele.

Sekvis interveno de Nicole Margot, kiu alvokis pri kreado de taŭga informilo pri esperanto en la franca lingvo kun svisaj kontaktadresoj.





La koruso de Etoy : Dominique de Mestral, Nancy Fontannaz, Nicole Margot kaj Elisabeth de Mestral.



La komitatanoj Hans-Werner Grossmann kaj Bruno Graf ĝojaj pri la sukceso de la aranĝo.

La ĉeestantoj deziris profiti pri la rekta kontakto kun la prezidanto de UEA kaj starigis multajn demandojn al li. Temis ekzemple pri akcepto kaj oficialigo de novaj vortoj, kiuj ekaperas en esperanto, kaj pri kiuj longe diskutas la Akademio. Prestiĝo, kiu povus helpi la pli larĝan akceptigon de la lingvo, estis alia diskutemo. Oni menciis diversajn statistikojn kaj manierojn

diskuti pri la nombro de esperanto-parolantoj en la mondo. Renato Corsetti rakontis al ni kiel okazas la rilatoj inter UEA kaj ties membraro. Li atentigis pri la fakto, ke la reto ja plifaciligas kaj plirapidigas la kontaktoblojn, tamen ne estas ĉiuhore deĵoranto ĉe la diversaj postenoj de la Centra Oficejo.



Nicole Margot kaj Charlotte Maillard anonas baldaŭan prelegon de Claude Piron en Genève.

Post vespermanĝo la tago finiĝis kun amika babilado inter la ĉeestantoj de tiu agrabla Orientsvisa Kulturrekonto. La duan, dimanĉan tagon, la migrademaj kunvenantoj trajnis al la proksima monto Pfannenstil por nature promeni kaj pludiskuti pri la aŭditaj prelegoj.

Grandan dankon al la organizantoj de la tre sukcesa evento: Nelly kaj Didi Weidmann!

Stefano Keller

La raportanto kaj fotisto



# **Ĝenerala Kunveno de Svisa Esperanto-Societo Ĝenevo, sabaton 28-an de aprilo 2007**

**Loko :** Maison des Associations, Rue des Savoises 15.

Tramoj 13 aŭ 15 antaŭ la stacidomo (direkto al Palettes), tria haltejo (Place du Cirque).

Manĝo en restoracio Allègre sandome.

## **Horaro :**

Dum la tago : librobrokantaĵo

10h30 Malfermo, akcepto

**11h00 Ĝenerala Kunveno de SES**

**12h30 Tagmanĝo**

Fr. 15.- plado (kun viando aŭ fiŝaĵo, aŭ vegetara, elekto surloka)

Fr 20.- menuo (salato, plado (vidu ĉi supre), deserto)

**14h30 Prelego de Claude Piron: « Sociorigina afazio »**

**16h00 Parto malfermita al la publiko**

Koruso esperantista

17h30 Programfino

Sekvas amika kunrestado kaj lasta rigardo al librobrokantaĵo

Raportoj kaj pliaj informoj aperos en la sekva *SES informas* 2007-1.

**Sed jam nun vi trovas aliĝan karton, kiu instigu vin tuj anonci vian partoprenon al tiu grava renkonto.**

-oOo-

## **Donacoj ricevitaj**

**Donacoj en frankoj al SES :** Traugott Rinaldo Aebi, Ittigen : 25 ; Christiane Andreae, Denges : 10 ; Pierrette Blanchet, Lausanne : 10 ; Verena & Gabrielle Chaves-Walder, Flawil : 50 ; Lucienne Dovat, Renens : 100 ; Andrée Gacond, La Chaux-de-Fonds : 30 ; Mireille Grosjean, Les Brenets : 250 (por Comptoir Suisse) ; Noël Huguenin, La Chaux-de-Fonds : 40 ; Hans Kästli, Rheineck : 10 ; Alois Koller, Zürich : 30 ; Jean-Jacques Lavanchy, La Tour-de-Peilz : 30 ; Verena Mallepell, Wettingen : 5 ; Gabriel Marchon, Corminboeuf : 10 ; Hans Meier, Basel : 37.15 ; Madeleine Noser, Zürich : 5 ; Didier Nüesch, Bern : 15 ; Parzival, Biel : 5 ; Paul Scherer, Emmenbrücke : 5 ; Marguerite Viredaz,



Lausanne : 20 ; Henri Wettstein, Versoix : 15 ; Véra Zaslavsky, La Chaux-de-Fonds : 15. **Sume : 717.15.**

**Novaj patronoj 2006** : Bertrand Bratschi, Genève ; Alois Koller, Zürich.

Nome de SES la kasisto Hans-Werner Grossmann dankas al la registritaj donacintoj pro ties malavareco.

-oOo-

## Mortoj

### Elsbeth Walder-Guggenbühl – 1919-2006

Elsbeth Walder-Guggenbühl forpasis la 16-an de novembro 2006 en Ütikon ĉe la lago de Zürich, kie ŝi loĝis en maljunulejo.

Ŝi naskiĝis en Meilen la 16-an de aŭgusto 1919 kiel kvina kaj lasta filino de vinber-kultivisto. En ŝia familio ĉiam estis vigla kunvivado kun multaj personoj, kiuj laboris en la granda kamparana domo. Elsbeth ŝatis tiujn kontaktojn kaj baldaŭ vigle interesiĝis pri la fremdaj lingvoj.

Post la lerneja periodo por konatiĝi kun la itala ŝi vojaĝis al la suda parto de Svislando. Ankaŭ en Romandio ŝi renkontis franclingvanojn. Ŝi lernis la anglan en Britio laborante kiel kuiristino ĉe militfunkciulo. Post sia reveno Svislanden en Zürich ŝi lernis la profesion de flegistino.

Elsbeth konatiĝis kun esperanto en 1943 kaj la lingvon internacian ŝi lernis per poŝta kurso. Otto Walder, kiu ricevadis kaj korektis ŝiajn ekzercojn, invitis ŝin al la kunvenoj de Esperanto-Societo Zürich, kiuj tiam disvolviĝis en kluba lokalo ĉe Karl der Grosse. Okaze de tiuj renkontiĝoj Otto kaj Elsbeth sentis reciprokan amon kaj ilia geedziĝo okazis en 1945.

Elsbeth sekvis sian edzon Otto Walder al Romanshorn, kie li ricevis laboron kiel lokomotivestro. Al ili naskiĝis tri filinoj: Monika, Ruth kaj Verena, al kiuj ili instruis esperanton. Ilia kvarĉambra loĝejo ofte fariĝis gastigejo de esperantistoj el la tuta mondo.

En Kristana Esperantistista Ligo Internacia Elsbeth trovis siajn spirite plej intimajn geamikojn. Ŝi regule partoprenis la kongresojn de KELI kaj de 1980 ĝis 1986 prezidis la svisan sekcion de KELI. Kaj kun sia edzo ŝi ankaŭ partoprenis kelkajn Universalajn Kongresojn kaj fervojistajn renkontojn kaj vigle apogis la aktivecojn de SES.

Post la morto de sia edzo en 1988 Elsbeth forlasis Romanshorn kaj revenis al sia domo en Meilen, kie ŝi plue ŝatis gastigi esperantistojn, montrante al ili belaĵojn el Svislando. Ekde sia 82-a jaro ŝi instaliĝis en maljunulejo en Ütikon kaj akompane de siaj filinoj ŝi plue partoprenis esperanto-okazaĵojn.



## Stanislaw Pochanke – 1934–2007

Stanislaw Pochanke forpasis la 15-an de februaro 2007. Li naskiĝis la 23-an de julio 1934 en Pollando, kaj kiel informas *Svisa Enciklopedio Planlingva*, antaŭ ol ekvigligi la aktivecon de Esperanto-Klubo en Wil, li estis unue tre aktiva esperantisto en sia denaska lando. Li oficis en Pola Esperanto-Asocio kiel vicprezidanto de la filio de PEA en Gliwice en la jaroj 1960-1970 kaj kiel sekretario de PEA en la silezia regiono, kiel prezidanto kaj kasisto de la PEA-filio en Katowice-Biała, kaj kiel esperanto-instruisto. Li posedis du esperanto-diplomojn kaj partoprenis Cseh-metodan seminarion en 1959. En 1981 PEA, kies dumviva membro li estis, esprimis al li sian dankemon per aljuĝo de la titolo de Merita Esperantisto.

Post studoj pri metalurgio en la krakova universitato kaj magistriĝo kiel inĝeniero Stanislaw laboris kiel teknologo en metalurgia uzino en Katowice kaj kiel instruisto en mezlernejo en Bielsko-Biała.

Ekde 1988 li migris al Svislando kun sia edzino Barbara Pochanke-Grzywa kaj siaj gefiloj Robert, Dawid kaj Vera, ĉiuj esperanto-parolantaj, por labori en la Psikiatria Hospitalo de Wil, kie dank'al la iniciato de Hans Kästli esperanto fariĝis unu el la deĵorlingvoj. Ili aktivis kiel helpflegistoj.

Unua kontakto de Stanislaw kun la svisaj esperantistoj okazis kadre de tutsemajna migrado ĉirkaŭ la monto Gotardo, kiun organizis Svisa Esperanto-Junularo en kunlaboro kun Maŭro de Sassi. Tiam ĉiuj migrantoj aprezis lian afablecon kaj bonhumoron malgraŭ konstanta pluvado!

Kaj baldaŭ ĉefe ĝuis pri la esperanto-kompetenteco de Stanislaw la membroj de Esperanto-Klubo Wil, kiun li prezidis kaj nelacigeble vigligis ekde 1989 ĝis 2005, kiam pro malsaniĝo li devis retiriĝi el siaj poresperantaj aktivecoj. Lia laboro estis modela: li ne nur prelegis kaj instruis entuziasmige, sed ankaŭ instigis ĉiujn klubanojn al kiel eble plej aktiva kunlaboro.


-oOo-

Al ambaŭ familioj Walder kaj Pochanke, kies pluraj gefiloj estas esperantistoj kaj SES-anoj, Svisa Esperanto-Societo esprimas sian profundan dankemon pro la efika aktiveco de Elsbeth kaj Stanislaw kun la espero, ke la gefiloj plue aktive fidelos al la esperanto-idealo.

Nome de SES, Claude Gacond.

-oOo-





# Loka vivo

## Basel

Esperanto-Societo Basel

PF 103, 4005 Basel

Tel.: 0049 76 214 57 12.

Kunvenoj : 20 h 00 en la kelo de la malantaŭa domo, Riehenring 129.

### Venontaj kunvenoj

Aprile 26 : Temo: Agavoj.

Maje 25 : Ĉe Berthe Spalinger.

Junie 28 : Grün.

Julie 12 : Krad-rostado ĉe H.-P. Senn.

-oOo-

## Genève

Esperanto-Grupo „La Stelo“

Case postale 734, 1212 Grand-Lancy.

Espéranto-Infos : Tel. : 022 740 04 45.

Monata kunveno la unuan mardon de la monato (krom julie kaj aŭguste) 20h00 en la stacidomo de Cornavin, kajo 1, Salono 2.

### Venonta kunveno

Aprile 3 : Temo : *Hodler en Mostar* de Spomenka Štimec.

-oOo-

## Lausanne

Laŭzana Esperanto-Societo

CP 246, 1000 Lausanne 22.

Tel: 076 411 14 55

[esperanto@isuisse.com](mailto:esperanto@isuisse.com)

<<http://www.esperanto.ch/Lausanne>>

Kunvenoj : Stacidomo, 1-a etaĝo, ĉiun unuan lundon de la monato je la 20h00.

### Venontaj kunvenoj

Aprile 04 : Kunveno.

Maje 05 : Kunveno.

Junie 24-25 : Enĉaleda semajnfino.

-oOo-

## Luzern

Lucerna Esperanto-Societo

Adligenstr. 1/49, 6020 Emmenbrücke.

Tel.: 041 280 46 12.

Kunvenejoj:

Restoracio Emmenbaum: Gerliswilstr. 8, 6020 Emmenbrücke.

Restoracio „bellini“ (hotelo Continental-Park) Murbacherstr. 4. Tel.: 041 228 90 50

Ĉe Ges-roj Anna & Koni Rey, Heimatweg 4, 6003 Luzern. Tel.: 041 210 25 88.

### Venontaj kunvenoj

Aprile 11 : Ĉe Rey : 14h00 : Paroliga leciono. 14h30: De Hillel al Homaranismo, kun Sonja Brun.



**Maje 09** : Ĉe Bellini : 14h00-16h00 :  
Konversacia rondo, kun Paul Scherer.

**Junie 13** : Ĉe Rey: 14h00 : Paroliga  
leciono, kun Paul Scherer. 14h30 : La  
historio kaj frabrikado de ĉokolado,  
kun Annelies Dettling.

**Julie 11** : Ĉe Bellini : 14h00-16h00 :  
Konversacia rondo, kun Sonja Brun.

**Aŭguste 10** : Ekskurso vespera (Pro-  
gramo anoncota).

**Septembre 12** : Ĉe Bellini : 14h00-  
16h00 : Konversacia rondo, kun Paul  
Scherer.

**Oktobre 10** : Ĉe Rey : 14h00 : Parol-  
iga leciono, kun Paul Scherer. 14h30 :  
Pensiulino parolas pri aktiva 3-a aĝo,  
kun Margrit Scherer.

**Novembre 14** : Ĉe Bellini : 14h00-  
16h00 : Konversacia rondo, kun Sonja  
Brun.

**Decembre 12** : Ĉe Rey : 14h00: Parol-  
iga leciono. 14h30 : Zamenhofologio  
kaj Programo 2007, kun Paul Scherer.

**2008 Januare 09** : Ĉe Bellini. 14h00-  
16h00 : Konversacia rondo, kun Sonja  
Brun.

# Wil

## Esperanto-Klubo Wil

[www.esperanto.ch/wil](http://www.esperanto.ch/wil)

Kunprezidantoj: Verena Chaves-Walder,  
Rosenhügelstr. 22, 9230 Flawil. Tel.: 071 393  
41 49. [chaves-walder@bluwin.ch](mailto:chaves-walder@bluwin.ch) kaj  
Wolfram Fischer. Steigstrasse 12, 9116  
Wolfertswil. Tel.: (P) 071.390.04.48 (O)  
071.390.04.44. Fax: 071.390.04.47

Kunvenoj: la unuan merkredon de la monato  
je la 19 h 00 en la Restoracio Blumeneck,  
Sântisstrasse 1 (apud la suda elirejo de la  
fervoja stacidomo).

## Raporto

Somere nia kutima ekskurso estis  
interesa. Lilian Siegrist montris kaj  
klarigis pri kelkaj gravaĵoj de Flawil,

interalie pri la maljuna forĝejo, la  
grandegaj lignaj skulptaĵoj de la artisto  
J. U. Sieger pri la varma sudvento Föhn  
kaj la ŝtormvento Lothar. Partoprenis  
esperantistoj el eksterlando : Ines kaj  
Christoph Frank el Rottweil. Post-  
tagmeze Christoph, pupludisto kaj  
lingva artisto, prezentis humurplenan  
legadon el ursorakonto.

Septembre Stanislaw Pochanke raportis  
pri la UK en Florenco. Poste estis  
diskutita la tezo de Umberto Eco,  
semiotikisto, ke neniu subtenanto de  
esperanto starigis al si la problemon pri  
la lingva relativismo aŭ zorgis pri la  
fakto, ke malsamaj lingvoj organizas  
sian enhavon en manieroj malsamaj kaj  
reciproke nerilatigaj.

Novembre antaŭ la raporto pri la  
Orientsvisa Esperanto-Kultur-renkonto  
de Wolfram Fischer okazis lingva  
ekzercado dediĉita al la refleksiva  
pronomo si.

Inter majo kaj oktobro Olivia Fischer  
gvidis en Uzweil dek du-horajn  
esperanto-lecionojn kun unue 9, fine 4  
lernantoj.

La jaro 2007 triste komenciĝis per la  
anonco de la morto de la tiom ŝatata  
prezidinto Stanislaw Pochanke, kies  
enterigo okazis la 22-an de februaro. Li  
endormiĝis pace post pacience eltenita  
malsano.

Al Barbara Pochanke, Robert kaj  
Lucyna Pochanke kun Raffael kaj  
Nicole, al Dawid kaj Ciara Pochanke  
kaj Leonardo, al Veronika Pochanke  
kaj Beat Sigrist, ĉiuj Wil-klubanoj kaj  
SES-membroj esprimas sian dankemon  
pro la fruktodona poresperanta aktiveco  
de Stanislav Pochanke.

-oOo-



# Zürich

## Esperanto-Societo Zürich

Akazienstr. 6 / PF 858, 8034 Zürich-Seefeld.

Tel.: 044 251 50 25

[info@esperanto.ch](mailto:info@esperanto.ch). reto:

[www.esperanto.ch/zuriko](http://www.esperanto.ch/zuriko)

**Regula merkreda programo** : krom dum la ferioj : 18.00–18.45 : kurso por komencantoj. 19.00–19.45 : konversacia rondo. (bonvolu telefone aliĝi dum la oficeja horaro ĝis la tago antaŭa : 044 251 50 25 aŭ retroŝte : [info@esperanto.ch](mailto:info@esperanto.ch)).

## Venonta kunveno

**Marte 23** :

16h00 : gazetara konferenco pri la Svisa Enciklopedio.

18h00 : vespermanĝo (bonvolu aliĝi telefone : 044 251 50 25

aŭ rete: [kursoj@esperanto.ch](mailto:kursoj@esperanto.ch)

19.30 : ĝenerala kunveno de Esperanto-Societo Zuriko.

20h30 : prezentado de kantoj de la plej nova CD-disko de Nelida, Jasmin kaj Linda Weidmann kaj Mike West.

## Esperanto-kursoj

ESZ ofertas regule privatajn lecionojn por 1-3 personoj por ĉiuj niveloj kaj semajnfinajn kursojn en feridomo en Alt Sankt Johann. Informojn petu de Nelida Weidmann

telefone : 044 251 50 25

aŭ rete : [kursoj@esperanto.ch](mailto:kursoj@esperanto.ch)

## Programo de

## Esperanto-Societo Zuriko

La aktualan programon de Esperanto-Societo Zuriko troveblas sub:

<http://www.esperanto.ch/zuriko/programo.html>

## Pri nia bulteno

### *Svisa Esperanto-Societo informas*

Pro pluraj kaŭzoj malfruis la apero de tiu ĉi lasta numero 2006-5 (novembro-decembro) de nia organo *SES informas*. Nur je la 19-a de marto 2007 ĝi povis fine dissendiĝi. Pardonpetas pro tio la redaktoro Claude Gacond.

Nova redakta formulo eksperimentiĝos ekde la jaro 2007 cele al garantio de pli regula apero.

Stefano Keller, la sekretario de SES, respondecos pri la redaktado de la parto dediĉita al la **Vivo de SES**.

Pri la **Kulturaj paĝoj** plue zorgos Richard Schneller.

La parton, kiu estas dediĉita al la **Tutsvisa aktiveco** kaj al la **Loka vivo**, plue prizorgos Claude Gacond, kun la espero, ke foje kompetentulo sin proponos por transpreni la koncernan redaktan funkcion.

Kaj dum la jaro 2007 trankvile reorganiziĝos la kovrila formulo.

Novaj redaktaj kunlaboroj tutcerte bonevenas. Kiu sentas sin kompetenta kaj laborema, tiu ne hezitu proponi sian helpon.



DE HILELISMO AL HOMARANISMO ĉe L. L. ZAMENHOF  
Resume pri ĉefaj klarigoj dum la kurso pri hilelismo / homaranismo  
(parto tria kaj lasta)  
(prelego prezentita dum UK Florenco 2006)  
De Andreas Künzli

En la sama jaro 1906 Zamenhof volis prezenti sian hilelism-on-homaranism-on al la partoprenantoj de la 2a universala kongreso de la e-istoj en Ĝenevo. Sed ho ve! – oni baris al li tiun intencon. Emile Javal, eminenta franca e-isto, kompreninte la tiklan situacion, kiun Zamenhof kaŭzis kun sia doktrino, konsilis al la humanisto el Varsovio eĉ ne veturi Ĝenevon por eviti publike paroli pri la homaranismo kaj tiel eviti eventualan skandalon. La aŭtoro de Esperanto ofendiĝis kaj efektive dubis ĉu li entute alvenu en la kongreso.

#### Korespondaĵoj kun Javal

Konserviĝis la kortuŝa korespondado inter Zamenhof kaj Javal de aŭgusto 1906, kiu bone montras la dubeman sintenon de Zamenhof. Mi ne povas prezenti ĉi tie tiun korespondadon en sia plena longeco, sed kelkajn ĉerpaĵojn oni povas citi, ekzemple el la letero de Zamenhof al Javal de la 3a de aŭgusto 1906:

“Mi danke ricevis Vian leteron de 29a VII. Laŭ Via konsilo mi eljetos el mia kongresa parolo la lastan parton tuŝantan la homaranism-on kaj mi parolos nur pri la interna ideo de la esperantismo, lasante al ĉiu klarigi al si la esencon de la ideo, kiel li volas. Pri mia veno Ĝenevon mi povas diri al Vi jenon: Post la ricevo de Via letero mi tuj decidis, ke mi *ne* iros Ĝenevon, ĉar tia estis ankaŭ mia propra deziro, sed mi nur timis, ke per tio mi faros malagrablaĵon al la esperantistoj kaj precipe al la organizantoj de la kongreso. Kiel homo *privata* mi partoprenus en ĉiu kongreso kun la plej granda ĝojo, sed kiel homo *oficiala* mi ĉiam tre ĝojis, ĉar mi diris

al mi, ke nun mi povas resti hejme kun pura konscienco. Sed pripensinte bone la aferon, mi ektimis, ke mia neveno, eĉ sub la preteksto de grava malsano, farus malbonan impreson kaj tre malbonigus la humoron de la kongresanoj. Tial mi petas Vin, volu denove pripensi la aferon kaj skribi al mi Vian opinion, nome:

- a) ĉu mi devas tute ne veni Ĝenevon;
- b) ĉu mi devas tien veni, malfermi la kongreson kaj la sekvantan tagon tuj forveturi silente, sub la preteksto de malsaneco;
- c) ĉu mi devas resti en Ĝenevo ĝis la oficiala fermo de la kongreso?

Pli malpli la saman leteron li sendis al generalo Sebert, kiu konsilis rezigni pri la homaranismo kaj fari kelkajn ŝanĝojn en la parolado.

#### Ĉu veni aŭ ne Ĝenevon ?

En alia letero al Javal, nome je la 15a de aŭgusto el Bad Reinerz, Germanio, Zamenhof konfirmis sian ŝanceliĝadon ĉu veni al Ĝenevo aŭ ne. Devis esti emocia kaj iom turmenta periodo por Zamenhof, kiu ne povis scii, kio okazos en Ĝenevo.

Li skribis do al Javal:

“Mi skribis jam al Vi, ke mi persone tre nevolonte veturas Ĝenevon. Se la komitato de organizado trovus, ke la bono de Esperanto postulas, ke mi ne venu Ĝenevon, mi akceptus tion ĉi kun tre granda plezuro. (...) Pripensinte la aferon pli multe, mi venis al la konkludo, ke mia forestado farus en la kongreso tre malbonan impreson. Oni suspektos ian kaŝitan kaŭzon, eble malpacon inter mi kaj la organizantoj; oni suspektos, ke mi ne havas sufiĉe da kuraĝo por defendi publike miajn ideojn, ke mi forkuras de la kampo de batalado. (...)”



## Ĉu rezigni pri homaranismo?

Vi povas tamen esti trankvila. Mi faros en Ĝenevo nenion sen antaŭa konsiliĝo kun Vi kaj kun la komitato de organizado. Mia *persona* opinio koncerne la duan parton de mia parolo estas simila al la Via, t.e. mi opinias, ke mi *ne* devus ĝin forigi, sed montri min tute malkaŝe tia, kia mi estas, por meti finon al ĉiuj malĝustaj famoj. Ŝajnas al mi, ke tia malkaŝa eliro alportus al Esperanto pli da bono ol da malbono, tiom pli ke mi anoncus tute klare, ke la homaranismo prezentas mian dogmaron pure *personan*, ke mi ĝin al neniu altrudas, ke mi eĉ tute ne havis la intencon paroli pri ĝi publike, sed mi decidis tion ĉi nur en la lasta minuto, por meti finon al diversaj malĝustaj famoj. (...) Se la komitato de organizado restos ĉe tia opinio, ke la legado de la dua parto de mia parolo povas esti malutila, tiam mi senproteste ĝin forigos. En tia okazo mi en Ĝenevo tute silentos pri la homaranismo. (...) Tiamaniere devas malaperi Via timo, ke mia veno Ĝenevon povas fariĝi danĝera.

## Zamenhof timas skandalon

Sekvis ankoraŭ unu korespondaĵo inter Javal kaj Zamenhof, kiu devis tute konfuzi la aŭtoron de la homaranismo, kaj Zamenhof la 20an de aŭgusto ne plu sciis kion fari. Li respondis al Javal:

“Hieraŭ vespere mi ricevis Vian telegramon, kiu min tute konfuzis. Nun mi absolute ne scias, kiel agi. De unu flanko mi komprenas tre bone, ke, se Vi tiel obstine restas ĉe Via opinio kaj ĉiam konsilas al mi ne veturi, Vi sendube havas por tio ĉi iajn gravajn kaŭzojn. (...) Mi supozas ankaŭ, ke en la mondo esperantista ekzistas kelkaj fluoj aŭ intencoj, kiujn mi, kiel tute izolita, ne scias, sed kiujn Vi, komunikiĝanta kun multaj personoj, bone vidas. Tial mi tre volonte dezirus plenumi Vian konsilon kaj resti hejme. Sed de la dua flanko mi, tute ne komprenante ĝis nun la kaŭzojn, kiuj kreis Vian opinion, vidas nur tro klare la grandan

skandalon, kiun povus kaŭzi mia neveno Ĝenevon, tiom pli ke en la daŭro de tuta jaro oni bedaŭrinde anoncadis, ke la kongreso estos sub mia prezidado. Oni diros kredeble, ke mi ne venis pro la homaranismo, ke mi min kaŝas, ke mi ne sole ne havas la kuraĝon defendi miajn ideojn publike, sed mi post la publikigo de la homaranismo ne kuraĝas eĉ montri min al la mondo.” (...) La situacio sekve estas nun jena: la utilon, kiu venus de mia neveturado, mi ĝis nun ankoraŭ ne bone komprenas; dume la grandan *malutilon* kaj diversajn malagrablecojn, kiuj donus mia neveturado, mi vidas tro bone; tial mi dume, ĝis ricevo de pli detala klarigo de Vi, decidis prepariĝi al la vojaĝo. Sed en la okazo, se Via opinio ĝis nun ne ŝanĝiĝis (...) tiam mi blinde plenumos Vian konsilon kaj mi restos hejme”.

Do estis evidente la lasta letero de Zamenhof al Javal. Supozeble li forveturis la 23an de aŭgusto, kaj la 28an de aŭgusto li realigis sian parolon antaŭ la dua kongreso en Ĝenevo.

La elstara parolado de Zamenhof trovis varman akcepton en Ĝenevo, kaj ĝi restis enhance, stile kaj retorike unu el la plej trafaj, brilaj kaj impresaj tekstoj iam ajn verkitaj en Esperanto pri tiu ĉi temo.

Kvankam la hilelismo-homaranismo mem poste estis grandparte forgesita de la e-istoj, multaj inter ili estas konvinkitaj, ke sen tiu ideologia bazo la interna ideo de Esperanto ne ekzistus. Ĝuste la interna ideo respondecas apud la genia gramatika konstruado de la lingvo Esperanto, ke tiuj lingvo kaj movado pluvivis. Do ekzakte en tiuj du punktoj Esperanto distingiĝas de aliaj planlingvoj, kiuj post Esperanto estis proponitaj kaj kiuj fakte estas pli lingvistike ol sociideologie orientitaj.



**Kongresparolado de L.L. Zamenhof okaze de la Dua Universala Kongreso de Esperanto en Ĝenevo, la 28an de aŭgusto 1906.**

(laŭ ludovikito, klopodis organizi, sed vane!, p. 361-369; subtitoloj aldonitaj de aK)

Estimataj sinjorinoj kaj sinjoroj!

Mi esperas, ke mi plenumos la deziron de ĉiuj alestantoj, se en la momento de la malfermo de nia kongreso mi esprimos en la nomo de vi ĉiuj mian koran dankon al la brava svisa lando por la gastameco, kiun ĝi montris al nia Kongreso, kaj al lia Moŝto la Prezidanto de la Svisa Konfederacio, kiu afable akceptis antaŭ du monatoj nian delegitaron. Apartan saluton al la urbo Ĝenevo, kiu jam multajn fojojn glorie enskribis sian nomon en la historion de diversaj gravaj internaciaj [kaj homunuigaj<sup>1</sup>] aferoj.

Permesu al mi ankaŭ, esprimi en la nomo de vi ĉiuj nian koran dankon al la organizintoj de la nuna Kongreso. [Zamenhof dankas al la svisaj esperantistoj, al la Provizora Centra Organiza Komitato, ktp.]

Sinjorinoj kaj sinjoroj!

Ĉe la malfermo de nia Kongreso vi atendas de mi ian parolon; eble vi atendas de mi ion oficialan, ion indiferentan, palan kaj senenhavan, kiel estas ordinare la oficialaj paroloj. *Tian* parolon mi tamen ne povas doni al vi. Mi ĝenerale ne amas tiajn parolojn, sed precipe *nun*, en la nuna jaro, tia senkolora oficiala parolo estus granda peko de mia flanko. Mi venas al vi el lando, kie nun multaj milionoj da homoj malfacile batalas por libereco, por la plej elementa homa libereco, por la *rajtoj de homo*. Pri tio ĉi mi tamen ne parolus al vi; ĉar se kiel *privata homo* ĉiu el vi eble sekvas kun intereso la malfacilan bataladon en la granda multmiliono lando, tamen kiel *esperantistojn* tiu ĉi batalado ne povus vin tuŝi, kaj nia Kongreso havas nenion komunan kun aferoj politikaj. Sed krom la batalado pure politika en la dirita lando estas nun faranta io, kio nin kiel esperantistojn ne povas ne tuŝi: ni vidas en tiu lando kruelan bataladon inter la *gentoj*. Tie ne homo de unu lando pro politikaj patrolandaj interesoj atakas homojn de alia lando – tie la naturaj filoj de sama lando ĵetas sin kiel kruelaj bestoj kontraŭ la tiel same naturaj filoj de tiu sama lando nur tial, ĉar ili apartenas al alia gento. Ĉiutage estingiĝas tie multe da homaj vivoj per batalado politika, sed multe pli da homaj vivoj estingiĝas tie ĉiutage per batalado *intergenta*. Terura estas la stato de aferoj en la multelingva Kaŭkazo, terura estas la stato en la Okcidenta Rusujo. Malbenita, milfoje malbenita estu la intergenta malamo!

Bjelostok kaj la batalado inter la gentoj

Kiam mi estis ankoraŭ infano, mi, en la urbo Bjelostok, rigardadis kun doloro la reciprokan fremdecon, kiu dividas inter si la naturajn filojn de sama lando kaj sama urbo. Kaj mi revis iam, ke pasos certa nombro da jaroj, kaj ĉio ŝanĝiĝos kaj boniĝos. Kaj pasis efektive certa nombro da jaroj, kaj anstataŭ miaj belaj songoj mi ekvidis teruran efektivaĵon; en la stratoj de mia malfeliĉa urbo de naskiĝo sovaĝaj homoj kun hakiloj kaj feraj stangoj sin ĵetis kiel plej kruelaj bestoj kontraŭ trankvilaj loĝantoj, kies tuta kulpo konsistis nur en tio, ke ili parolis alian lingvon kaj havis alian gentan religion, ol tiuj ĉi sovaĝuloj. Pro tio oni frakasis la kraniojn kaj elpikis la okulojn al viroj kaj virinoj, kadukaj maljunuloj kaj senhelpaj infanoj! Mi ne volas rakonti al vi la terurajn detalojn de la bestega Bjelostoka buĉado; al vi kiel al esperantistoj mi volas nur diri, ke terure altaj kaj dikaj estas ankoraŭ la interpopolaj muroj, kontraŭ kiuj ni batalas.

Oni scias, ke ne la rusa gento estas kulpa en la besta buĉado en Bjelostok kaj multaj aliaj urboj; ĉar la rusa gento neniam estis kruela kaj sangavida; oni scias, ke ne la Tataroj kaj



Armenoj estas kulpaj en la konstanta buĉado, ĉar ambaŭ gentoj estas gentoj trankvilaj, ne deziras altrudi al iu sian regadon, kaj la sola, kion ili deziras, estas nur, ke oni lasu ilin trankvile vivi. Oni scias nun tute klare, ke kulpa estas aro da abomenindaj krimuloj, kiuj per diversaj plej ruzaj kaj plej malnoblaj rimedoj<sup>2</sup>, per amase dissemataj mensogoj kaj kalumnioj arte kreas teruran malamon inter unuj gentoj kaj aliaj. Sed ĉu la plej grandaj mensogoj kaj kalumnioj povus doni tiajn terurajn fruktojn, se la gentoj sin reciprokas bone konus, se inter ili ne starus altaj kaj dikaj muroj, kiuj malpermesas al ili libere komunikiĝadi inter si kaj vidi, ke la membroj de nia gento<sup>3</sup>, ke ilia literaturo ne predikas iajn terurajn krimojn, sed havas tiun saman etikon kaj tiujn samajn idealojn kiel nia? Rompu, rompu la murojn inter la popoloj, donu al ili la eblon libere konatiĝi kaj komunikiĝi sur neŭtrala fundamento, kaj nur tiam povos malaperi tiaj bestaĵoj, kiujn ni nun vidas en diversaj lokoj.

Ni ne estas tiel naivaj, kiel pensas pri ni kelkaj personoj; ni ne kredas, ke neŭtrala fundamento faros el la homoj anĝelojn; ni scias tre bone, ke la homoj malbonaj ankaŭ poste restos malbonaj; sed ni kredas, ke komunikiĝado kaj konatiĝado sur neŭtrala fundamento forigos almenaŭ la grandan amason de *tiu* bestaĵoj kaj krimoj, kiuj estas kaŭzataj ne de malbona volo, sed simple de reciproka<sup>4</sup> sinnekonado kaj de devigata sinaltudado.

### La interna ideo

Nun, kiam en diversaj lokoj de la mondo la batalado inter la gentoj fariĝis tiel kruela, ni, esperantistoj, devas labori pli energie ol iam. Sed por ke nia laborado estu fruktoporta, ni devas antaŭ ĉio bone klarigi al ni la *internan ideon* de la esperantismo. Ni ĉiuj senkonscie ofte aludadis tiun ĉi ideon en niaj paroloj kaj verkoj, sed ni neniam parolis pri ĝi pli klare. Estas jam tempo, ke ni parolu pli klare kaj precize.

El la Deklaracio unanime akceptita en la Bulonja Kongreso ni ĉiuj scias, kio estas la esperantismo en rilato *praktika*; el tiu ĉi Deklaracio ni ankaŭ scias, ke „esperantisto estas nomata ĉiu persono, kiu uzas la lingvon Esperanto tute egale, por kiaj celoj li ĝin uzas”. Esperantisto sekve estas ne sole tiu persono, kiu revas unuigi per Esperanto la homaron, esperantisto estas ankaŭ tiu persono, kiu uzas Esperanton ekskluzive por celoj praktikaj, esperantisto ankaŭ estas persono, kiu uzas Esperanton por gajni per ĝi monon; esperantisto estas persono, kiu uzas Esperanton nur por amuziĝadi; esperantisto fine estas eĉ tiu persono, kiu uzas Esperanton por celoj plej malnoblaj kaj hommalamaj. Sed krom la flanko *praktika*, deviga por ĉiuj kaj montrita en la Deklaracio, la esperantismo havas ankoraŭ alian flankon, ne devigan, sed multe pli gravan, flankon *idean*. Tiun ĉi flankon diversaj esperantistoj povas klarigi al si en la plej diversa maniero kaj en la plej diversaj gradoj. Tial por eviti ĉiun malpacon, la Esperantistoj decidis lasi al ĉiu plenan liberecon, akcepti la internan ideon de la esperantismo en tiu formo kaj grado, kiel li mem deziras, aŭ – se li volas – eĉ tute ne akcepti por la esperantismo ian ideon. Por demeti de unuj esperantistoj ĉian respondecon por la agoj kaj idealoj de aliaj esperantistoj, la Bulonja Deklaracio precizigis la oficialan, de ĉiuj sendispute akceptitan esencon de la esperantismo kaj aldonis la sekvantajn vortojn: „Ĉiu alia espero aŭ revo, kiun tiu aŭ alia esperantisto<sup>5</sup> ligas kun la esperantismo, estas lia afero pure *privata*, por kiu la esperantismo ne respondas.” Sed bedaŭrinde la vorton „privata” kelkaj amikoj-esperantistoj klarigis al si en la senco de „malpermesata”, kaj tiamaniere anstataŭ konservi por la interna ideo de la esperantismo la eblon tute libere disvolviĝi, ili volis tiun ideon tute mortigi.

Nur la praktika utileco de Esperanto ne interesu nin!

Se ni, batalantoj por Esperanto, propravole donis al la vasta mondo plenan rajton rigardadi Esperanton nur de ĝia flanko praktika kaj uzadi ĝin nur por nia utilo, tio ĉi kompreneble al neniuj donas la rajton postuli, ke ni *ĉiuj* vidu en Esperanto nur aferon praktikan.



Bedaŭrinde en la lasta tempo inter la esperantistoj aperis tiaj voĉoj, kiuj diras: „Esperanto estas nur lingvo; evitu ligi eĉ tute private la esperantismon kun la *ideo*, ĉar alie oni pensos, ke ni ĉiuj havas tiun ideon, kaj ni malplaĉos al diversaj personoj, kiuj ne amas tiun ideon!” Ho kiaj vortoj! El la timo, ke ni eble ne plaĉos al tiuj personoj, kiuj mem volas uzi Esperanton nur por aferoj praktikaj por ili, ni devas ĉiuj elŝiri el nia koro tiun parton de la esperantismo, kiu estas la plej grava, la plej sankta, tiun ideon, kiu estis la ĉefa celo de la afero de Esperanto, kiu estis la stelo, kiu ĉiam gvidadis ĉiujn batalantojn por Esperanto! Ho, ne, ne neniam! Kun energia protesto ni forĵetas tiun ĉi postulon. Se nin, la unuajn batalantojn por Esperanto, oni devigos, ke ni evitu en nia agado ĉion idean, ni indigne disŝiros kaj bruligos ĉion, kion ni skribis por Esperanto, ni neniigos kun doloro la laborojn kaj oferojn de nia tuta vivo, ni forĵetos malproksimen la verdan stelon, kiu sidas sur nia brusto, kaj ni ekkrios kun abomeno: „Kun *tia* Esperanto, kiu devas servi ekskluzive nur al celoj de komerco kaj praktika utileco, ni volas havi nenion komunan!”

### Frateco kaj justeco inter ĉiuj popoloj

Venos iam la tempo, kiam Esperanto, fariĝinte posedaĵo de la tuta homaro, perdos sian karakteron idean; tiam ĝi fariĝos jam nur lingvo, oni jam ne batalados por ĝi, oni nur tirados el ĝi profiton. Sed nun, kiam preskaŭ ĉiuj esperantistoj estas ankoraŭ ne profitantoj, sed nur batalantoj, ni ĉiuj konscias tre bone ke al laborado por Esperanto instigas nin ne la penso pri praktika utileco, sed nur la penso pri la sankta, granda kaj grava *ideo*, kiun lingvo internacia en si enhavas. Tiu ĉi ideo – vi ĉiuj sentas ĝin tre bone – estas Tiu ĉi ideo akompanadis Esperantismon de la unua momento de ĝia naskiĝo ĝis la nuna tempo. Ĝi instigis la aŭtoron de Esperanto, kiam li estis ankoraŭ malgranda infano; kiam antaŭ dudek ok jaroj rondeto da junaj diversgentaj gimnazioj festis la unuan signon de vivo de la estonta Esperanto, ili kantis kanton, en kiu post ĉiu strofo estis ripetataj la vortoj: „malamikeco de la nacioj, falu, falu, jam estas tempo”. Nia himno kantas pri la „nova sento, kiu venis en la mondon”, ĉiuj verkoj, vortoj kaj agoj de la iniciatoro kaj de la unuaj esperantistoj ĉiam spiras tute klare tiun saman ideon. Neniam ni kaŝis nian ideon, neniam povis esti eĉ la plej malgranda dubo pri ĝi, ĉar ĉiu parolis pri ĝi. Kial do aliĝis al ni kaj sindone kaj senprofite laboris kun ni la personoj, kiuj vidas en Esperanto „nur lingvon”?<sup>6</sup> Kial ili ne timis, ke la mondo kulpigos ilin pri granda krimo, nome pri la deziro, helpi al iom-post-ioma-unuiĝo de la homaro? Ĉu ili ne vidas, ke iliaj paroloj estas kontraŭaj al iliaj propraj sentoj kaj ke ili senkonscie revas pri tio sama, pri kio *ni* revas, kvankam pro neĝusta timo antaŭ sensencaj atakantoj ili penas tion ĉi nei?

Se mi la tutan pli bonan parton de mia vivo memvole pasigis en grandaj suferoj kaj oferoj kaj ne rezervis por mi eĉ ian rajton de aŭtoreco – ĉu mi faris tion ĉi pro ia praktika utileco? Se la unuaj esperantistoj pacience elmetadis sin ne sole al konstanta mokado, sed eĉ al grandaj oferoj, kaj ekzemple unu malriĉa instruistino longan tempon suferis malsaton, nur por ke ŝi povu ŝpari iom da mono por la propagando de Esperanto – ĉu ili ĉiuj faris tion ĉi pro ia praktika utileco? Se ofte personoj alforĝitaj al la lito de morto skribadis al mi, ke Esperanto estas la sola konsolo de ilia finiĝanta vivo, ĉu ili pensis tiam pri la praktika utileco? Ho, ne, ne, ne! Ĉiuj memoris nur pri la interna *ideo* entenata en la esperantismo; ĉiuj ŝatis Esperanton ne tial, ke ĝi alproksimigas reciproke la *korpojn* de la homoj, eĉ ne tial, ke ĝi alproksimigas la *cerbojn* de la homoj, sed nur tial, ke ĝi alproksimigas iliajn *korojn*.

### La entuziasmo de Bulonjo

Vi memoras, kiel forte ni ĉiuj estis entuziasmigitaj en Bulonjo sur Maro. Ĉiuj personoj, kiuj partoprenis en la tiea kongreso, konservis pri ĝi la plej agrablan kaj plej entuziasman memoron por la tuta vivo, ĉiuj ĝin nomas „la neforgesebla kongreso”. Kio do tiel entuziasmigis la membrojn de la kongreso? Ĉu la amuzoj per si mem? Ne, ĉiuj ja povas havi sur ĉiu paŝo



multe pli grandajn amuzojn, aŭskulti teatraĵojn kaj kantojn multe pli bonajn kaj plenumatajn ne de nespertaj diletantoj, sed de plej perfektaj specialistoj! Ĉu nin entuziasmigis la granda talento de la parolantoj? Ne; ni tiajn ne havis en Bulonjo. Ĉu la fakto, ke ni komprenis nin reciproke? Sed en ĉiu kongreso de samnacioj ni ja komprenas nin ne malpli bone, kaj tamen nenio nin entuziasmigas. Ne, vi ĉiuj sentis tre bone, ke nin entuziasmigis ne la amuzoj per si mem, ne la reciproka sinkomprenado per si mem, ne la praktika utileco, kiun Esperanto montris, sed la interna *ideo* de la esperantismo, kiun ni ĉiuj sentis en nia koro. Ni sentis, ke komenciĝas la falado de la muroj inter la popoloj, ni sentis la spiriton de ĉiuhoma frateco. Ni konsciis tre bone, ke, ĝis la fina malapero de la muroj, estas ankoraŭ tre kaj tre malproksime; sed ni sentis, ke ni estas atestantoj de la unua ekbato kontraŭ tiuj muroj; ni sentis, ke antaŭ niaj okuloj flugas la fantomo de pli bona estonteco, fantomo ankoraŭ tro nebula, kiu tamen de nun ĉiam pli kaj pli korpiĝados kaj potenciĝados.

Jes, miaj karaj kunlaborantoj! Por la indiferenta mondo Esperanto povas esti nur afero de praktika utileco. Ĉiu, kiu uzas Esperanton aŭ laboras por ĝi, estas Esperantisto, kaj ĉiu Esperantisto havas plenan rajton vidi en Esperanto nur lingvon, simplan, malvarman internacian kompreniĝilon, similan al la mara signaro, kvankam pli perfektan. *Tiaj* Esperantistoj kredeble ne venos al niaj kongresoj aŭ venos al ili nur por celoj esploraj aŭ praktikaj aŭ por malvarma diskutado pri demandoj pure lingvaj, pure akademijaj, kaj ili ne partoprenos en nia ĝojo kaj entuziasmo, kiu eble ŝajnos al ili naiva kaj infana. Sed tiuj esperantistoj, kiuj apartenas al nia afero ne per sia kapo, sed per sia *koro*, tiuj ĉiam sentos kaj ŝatos en Esperanto antaŭ ĉio ĝian internan *ideon*; ili ne timos, ke la mondo moke nomos ilin utopiistoj, kaj la naciaj ŝovinistoj eĉ atakos ilian idealon kvazaŭ krimon; ili estos fieraj pri tiu nomo de utopiistoj. Ĉiu nia nova kongreso fortikiĝos en ili la amon al la interna ideo de la esperantismo, kaj iom post iom niaj ĉiujaraj kongresoj fariĝos konstanta festo de la homaro kaj de la homa frateco.

### Kion LLZ ne povis diri en Ĝenevo

La de kelkaj kolegoj proponitan koncepton de Esperanto, ke ĝi servu nur al praktikaj celoj sen konsideri la flankon idean, Zamenhof klare rifuzis. Tial okazis, ke la dua parto de la parolado pri homaranismo, kiun Zamenhof volis, sed ne povis laŭtlegi en Ĝenevo, estis publikigita nur en 1959 en

*La Nica Literatura Revuo*, n-ro 6. Fakte tiu parto konsistis, krom enkondukaj klarigoj, grandparte el la 'Deklaracio de homarano' mem.

Jen la enkondukaj vortoj de Zamenhof al tiu ĉi dua parto:

Mi diris, ke, krom la oficiala esenco de la esperantismo, kiu estas esprimita en la Bulonja Deklaracio, la esperantismo enhavas ankoraŭ *ideon internan*, kiu ne estas deviga por ĉiuj, sed kiun memvole kulturas en si ĉiuj esperantistoj-idealistoj. Tiun ĉi ideon ĉiu povas klarigi kaj formuli al si tiel, kiel diktas al li lia propra kapo kaj koro. Permesu al mi, ke mi raportu al vi, kiamaniere *mi* komprenas tiun ideon. Sed por eviti ĉiun malkompreniĝon, mi devas antaŭ ĉio atentigi vin, ke tio, pri kio mi nun parolos, prezentas miajn principojn pure *personajn kaj privatajn*. Mi ne sole ne proponas al vi ilian akcepton, sed mi eĉ ne demandas vian opinion pri ili. Mi simple nur raportos.



Mi parolos al vi pri tio, pri kio multaj el vi jam ion aŭdis - nome pri la "Homaranismo". Ne ektimu, sinjoroj! Mi scias, ke oni prezentis al vi la aferon kiel ion teruran, kiel grandan danĝeron por Esperanto. Estu paciencaj, aŭskultu kaj juĝu.

Mi neniam havis la intencon paroli en kongreso esperantista pri miaj privataj principoj kaj kredoj, kiuj estas formulitaj en la homaranismo. Antaŭ dek monatoj mi supozis, ke en la Ĝeneva kongreso mi eble en unu el la kunvenoj pure *privataj* preparolos miajn principojn; sed baldaŭ mi eĉ tiun ĉi mian intencon tute forĵetis. Dezirante, ke la mondo vidu en mi nur la aŭtoron de Esperanto, mi decidis kaŝi por ĉiam mian nomon kiel iniciatoron de la homaranismo, mi transdonis mian principaron al kelkaj amikoj kaj mi petis ilin, ke ili laboru.

Sed la cirkonstancoj aranĝiĝis tiamaniere, ke mi estas nun devigata ne sole forigi mian kaŝitecon, sed eĉ fari tion ĉi tute *publike*. En la komenco de tiu ĉi jaro, en la nomo de grupo da personoj, kiuj akceptis por si la nomon "Unua Grupo Homarana", aperis la unua broŝuro pri la homaranismo, kiu devis esti nur prova balono, por aŭskulti diversajn opiniojn. Sed malgraŭ ke en la broŝuro estis klare dirite, ke ĝia teksto estas nur provizora kaj poste perfektigota, kaj malgraŭ ke la broŝuro volis prezenti nur principaron tute *privatan*, al neniu altrudatan, kelkaj esperantistoj, anstataŭ trankvile kritiki la aferon, komencis akran atakadon kontraŭ ĝi. Tiuj ĉi atakoj devigis min forigi mian kaŝitecon, ĉar plua kaŝiteco povus pensigi, ke mi kaŝas min kontraŭ la batoj, aŭ ke mi hontas kaj timas konfesi publike miajn principojn; kaj ĉar oni baldaŭ komencis rakontadi, ke la iniciatoro de la homaranismo estas la aŭtoro de Esperanto kaj ke mi havas iajn kontraŭnaturajn principojn, kiuj baldaŭ pereigos la tutan aferon Esperantan, tial - por meti finon al „ĉiuj suspektoj kaj malĝustaj famoj - mi en la lasta monato antaŭ la kongreso decidis proklami miajn principojn tute *publike* en mia kongresa parolo.

Tiujn ĉi principojn mi nun prezentos al vi en formo de Deklaracio, kiun mi kaj miaj samprincipanoj akceptis por ni. Sed mi ripetas, ke la Deklaracio, kiun mi legos al vi, prezentas principojn pure *privatajn* de mi kaj de la Unua Grupo Homarana; por la mondo esperantista ili havas nenion devigan.

La Homaranismo estas celado al pura homeco kaj al absoluta intergenta justeco kaj egaleco. En ĉiu lando tiu gento, kiu prezentas la plimulton kaj kutimis regi super la aliaj gentoj, longe ne komprenos la homaranismon; sed neniu gento povas scii, kio estos kun ĝi morgaŭ, kaj, pli aŭ malpli frue, ĉiuj honestaj homoj konvinkiĝos, ke regado per fortoj konvenas al bestoj, sed ne al homoj, kaj ke paca vivado sur la tero kaj ĉeso de militoj estas ebla ne per malfortikaj kaj maljustaj kompromisoj, sed nur per justeco absoluta, egala por ĉiuj gentoj, lokoj kaj tempoj. Tian justecon penas esprimi la Deklaracio de la Homaranoj.

Ĉar pro tiu aŭ alia nelerta aŭ nepreciza esprimo en la Deklaracio la malamikoj de la homaranismo atakas la tutan esencon de la afero, tial mi ripetas la vortojn, kiuj per grandaj kaj grasaj literoj estis presitaj en la unua broŝuro pri la homaranismo, nome: la nuna teksto de la Deklaracio estas nur provizora; la definitiva teksto estos fiksita nur iam poste, post sufiĉe matura interkonsiliĝo inter ĉiuj grupoj homaranaj.

La versio antaŭvidita por laŭtlegado en Ĝenevo laŭ la ideoj esence identas kun la teksto de la Deklaracio de Homarano (Homaranismo) de marto 1906, post kiam Zamenhof forstrekis la nocion hilelismo. Tamen la ĝeneva versio estis draste prilaborita kaj modifita, tiel ke la teksto havas alian formon.

Komence de 1913, Zamenhof sendis al generalo Sebert sian planon por organizi

kongreson pri „neŭtrala religio“. Ĉe la pariza eldonejo Hachette Zamenhof klopodis eldoni la prilaboritan formon de la homaranismo. Ĉar ĝi malakceptis la aŭtoro de Esperanto publikigis la dogmaron en madrida gazeto sub la titolo

„Deklaracio pri Homaranismo“. Kiel komenton Zamenhof skribis: „Ne por la celo de propagando mi publikigas nun mian kredon; mi simple deziras, ke miaj amikoj



konu mian kredon, por ke ilin ne mirigu mia rilato al tiu aŭ alia politika aŭ religia demando kaj por ke la personoj, kiuj havas

la samajn principojn kiel mi, sciu ke ni estas samprincipanoj“. (majo 1913)

Notoj:

<sup>1</sup> „kaj homunuiĝaj“ mankas en O.V., sed ekzistas ĉe ludovikito.

<sup>2</sup> „kaj plej ruzaj“ mankas en O.V., sed ekzistas ĉe ludovikito

<sup>3</sup> en O.V. estas „aliaj gentoj“

<sup>4</sup> „reciproka“ mankas en O.V.

<sup>5</sup> en O.V. estas „persono“ anstataŭ „esperantisto“

6 en O.V. estas jena versio: ... ĉar ĉiu parolis pri ĝi kaj sindone kaj senprofite laboris kun ni. Kial do aliĝis al ni la personoj, kiuj vidas en Esperanto „nur lingvon“?

Bibliografio:

- ludovikito, klopodis organizi, sed vane!, p. 371-377.

- Mi estas homo. Originalaj verkoj de d-ro L.-L. Zamenhof. Serio Scio, Volumo 6, Sezonoj, Kaliningrado 2006.

- Van Kleef, C.: La Homaranismo de D-ro L.L. Zamenhof. Historia enketo pri la naskiĝo kaj evoluo de la Zamenhofs Homaranismo. Agen 1965.

- Dr. L.L. Zamenhofs Esperanto-Reden gehalten bei Eröffnung der Esperanto-Kongresse 1905-1912. Mit Einleitung über Programm und Ursprung des Esperantismus, begleitender deutscher Übersetzung und Anmerkungen. Herausgegeben von Dr. Emil Pfeffer. Wien (Jahrgabe fehlt).




Redaktas : Richard Schneller (rs), Höhenstrasse 1 b, CH-9302 Kronbühl, rischneller@gmail.com  
Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.

## La « Sessiun » en Romanĉio

*Post Ĝenevo kaj Lugano, Flemo (Flims) en Grizono gastigis la svisan parlamenton, kiu kutime kunvenas en la ĉefurbo Berno.*

Dum pluraj jaroj la parlamentejo en Berno estas renovigata. Tial la parlamentaj sesioj okazas en diversaj lingvoregionoj de la lando. Post Romandio

(Ĝenevo) kaj Tiĉino (Lugano), Romanĉio havis la honoron gastigi la parlamentanojn por trisemajna sesio (« Sessiun da Flem » en la romanĉa). Ĉi tiu evento trovis larĝan eĥon en la amasmedioj kaj atentigis pri la situacio kaj la problemoj de la kvara oficiala lingvo de Svislando, pri kiuj informis la parlamentanojn la Romanĉa Ligo.



*Foto el Swissinfo. Cetere interesa dosiero pri la romanĉa aperis rete ĉe Swissinfo : <http://www.swissinfo.org/fre/index.html> (→ Dosieroj → Rumantsch) en la germana, franca, itala, hispana, angla.*



Svisio havas 7 288 010 enloĝantojn. El tiuj 63,7 % parolas la germanan kiel ĉeflingvon, 20,4% la francan, 6,5% la italan kaj 0,5% (35 095 personoj) la romanĉan.

Pluraj aliaj lingvoj estas pli ofte parolataj ol la romanĉa : la serba kaj la kroata (1,5%), la albana (1,3%), la portugala (1,2%), la hispana (1,1%), la angla (1%) kaj la turka (0,6%).

*(Laŭ la popolnombro 2000)*

Flemo troviĝas en periferia regiono de Romanĉio kie la romanĉa transiras al la germana. En ĉi tiu turisma loko oni trovis la taŭgan infrastrukturon por parlamenta sesio. Flemo evoluis de

kamparana vilaĝo al feriloko por vintra turismo kun multaj hoteloj kaj feridomoj. La sesioj okazis en luksa hotelo kaj iu parlamentano ŝercis ke al li pli utilis vortaro de la portugala ol de la romanĉa... (ĉar inter la dungitoj estis multaj portugalaj kunlaborantoj). Aliaj parlamentanoj havis pli pozitivajn reagojn pri la okazigo de la sesio en Romanĉio. Por ili ĝi estis simbola signo por la konservado de la romanĉa. Pragmatuloj opiniis ke la elekto de Flemo fokusigis la atenton de la publiko konsciige sur la minacantan malaperon de la romanĉa. *(rs)*

## Tragedio kondukis al proksimiĝo de du popoloj


*Kvindek jaroj post la Hungara Revolucio oni memoris pri la eventoj kaj la akcepto de 14 000 rifuĝintoj en Svislando.*

• *Richard Schneller*

La hungara popolveiĝo prepariĝis jam en la jaro 1955 per liberaj diskutoj pri politikaj temoj en la aŭlo de la Teknika Universitato en Budapeŝto post konatiĝo de la sekreta parolado de Ĥruŝĉov pri la krimoj de Stalino.

La 23an de oktobro 1956 malgranda demonstracio de studentoj en Budapeŝto rapide kreskis ĝis amaskunveno protestanta kontraŭ la komunista reĝimo kaj postulanta liberan opiniesprimon, liberajn elektojn kaj sendependecon de Sovetio. La samon postulis demonstracioj en aliaj hungaraj urboj. La ŝtata sekureca polico intervenis per

armiloj kontraŭ la manifestaciantoj inter kiuj troviĝis ankaŭ dekmiloj da laboristoj ne kontentaj pri siaj malbonaj vivkondiĉoj. Soldatoj kaj policanoj simpatiis kun la ribelantoj kaj transdonis al ili siajn armilojn.



Budapeŝto 1956



## Bataloj kontraŭ tankoj

La 30an de oktobro 1956 la ĉefministro Imre Nagy proklamas, post la eksigo de la antaŭa registaro, la reenkondukon de la plurpartia sistemo, la neŭtralecon de Hungario kaj la ekzigon de Hungario el la Varsovia Pakto. Sed la 4an de novembro János Kádár anoncas ĉe la radio la fondon de « Hungara revolucia registaro de laboristoj kaj kamparanoj » kaj indikas ke li vokis la helpon de sovetiaj trupoj. Sovetaj tankoj invadis Budapeŝton kaj aliajn urbojn. La ribelantoj decide rezistis interalie per « Molotov-kokteloj » (brulboteloj, benzinbomboj) kontraŭ la tankoj. 2600 hungaroj kaj 700 sovetaj soldatoj estis la viktimoj de ĉi tiuj bataloj, pli ol 200 000 hungaroj forfuĝis eksterlanden. Miloj da personoj estis arestitaj kaj centoj mortkondamnitaj. Sekvis periodo de severa subpremo kiu suferigis centmilojn da hungaroj dum multaj jaroj.

Imre Nagy estis arestita kaj en 1958 okazis proceso en Budapeŝto. La 17an de junio la tuta mondo estis konsternita ekscii la ekzekuton de Imre Nagy kaj liaj kamaradoj Pál Maléter, Miklos Gimes kaj József Szilágyi.

## Ondo de solidareco

La batalo de la ribelantoj kontraŭ la potenca Ruĝa Armeo kaj la konsciiĝo pri la mizera ekonomia situacio postmilita en Hungario ekigis ondon de simpatio en Svislando, okazis protest-manifestacioj, materia helpo estis organizita kaj sendita tien kaj la fuĝintoj alvenintaj el aŭstraj kampadejoj estis solidare akceptitaj. Post kompreneblaj malfacilaĵoj en la komenco ili poste bone integriĝis en Svislando (kiel ekzemple ankaŭ la rifuĝintoj el Ĉeĥo-

slovakio en 1968). Favoris tion ne nur la malavara akcepto fare de Svislando, sed ankaŭ la ĝenerale bona profesia nivelo de la alvenintoj kaj la ekprospero de la svisa ekonomio. Ili miris pri la alta vivnivelo, sed tamen konsciiĝis ke oni devis streĉe labori kaj ke profesia kariero ne estis tiel rapida kiel ili imagis. Hodiaŭ oni ofte aŭdas la opinion ke la iamaj rifuĝintoj el orienta Eŭropo iĝis pli svisaj ol la svisoj. Eble oni povus klarigi ĉi tiun fenomenon per komparo: itala aŭ hispana laboristo enmigrinta en la kvindekaj jaroj sciis ke li povis ĉiam reveni al sia devenlando, dum por la elmigrintoj el Orienta Eŭropo tio ne eblis dum jardekoj antaŭ la falo de la fera kurteno.



Alveno de hungaraj rifuĝintoj en St.Margrethen ĉe la limo aŭstra-svisa.

## Komparo kun la hodiaŭa situacio

Historiistoj volonte substrekas ke la helpopreteco rilate la rifuĝintojn el Orienta Eŭropo ne estis motivita per nura malavareco, sed ke aliaj faktoroj ludis rolon, ekzemple la disvastigita antikomunismo, la bezono de la ekonomio trovi laborfortojn kaj la volo de



reparacio post la fermo de la limoj al rifuĝintoj dum la Dua Mondmilito.



Hodiaŭ la situacio rilate rifuĝintojn kaj enmigrintojn kompreneble ŝanĝiĝis kompare kun tiu de la jaro 1956. Ĉi-jare la svisaj civitanoj akceptis en septembro pliseverigon de la leĝoj pri enmigrintoj kaj eksterlandanoj per popola referendumo. Oni adaptis ilin al la normoj de la Eŭropa Unio kaj ili

devus eviti misuzojn. Fine de novembro denove okazos referendumo rilate la kontribuon de Svislando al la evolu-helpa fonduso por la 10 novaj EU-membroj orienteŭropaj (1 miliardo da svisaj frankoj por 5 jaroj). Kvankam la sindikatoj de la laboristoj kaj tiuj de la entreprenistoj estas por, la popolisma dekstro kontraŭas kaj la rezulto de ĉi tiu referendumo estas necerta.

## Novaj libroj en la katalogo de CDELI

Nun preskaŭ 4000 « noticoj CDELI » estas en la romanda reto (RERO). Tio signifas proksimume 10 000 bibliografiaj eroj (libroj aŭ broŝuroj) ĉar la politiko de CDELI estas konservi, ĉiufoje kiam eblas, tri ekzemplerojn el

la sama ero. La tria ekzemplero estas destinita al prunto (surloke aŭ tra aliaj bibliotekoj), ĉio ajn el la posedaĵoj estante konsultebla surloke en la legoĉambro de la Urba Biblioteko (La Chaux-de-Fonds).



Alia Venecio / Predrag Matvejević ; esperantigis Tomasz Chmielik ; [antaŭparolo de Renato Corsetti]. Czeladź : Hejme ; Świdnik : Libro-mondo, 2006.

Balenoj, delfenoj kaj aliaj mirindaĵoj de l'oceanoj / Marie-Christine Body, André Cherpillod ; esperanta versio de André Cherpillod. Courgenard : La Blanchetière, 2006.

Conversational esperanto : lively dialogues from everyday life = Ĉiutaga esperanto : viglaj interparoloj el la ĉiutaga vivo / Don Lord ; [foreword by Marjorie Boulton]. Barlaston : Esperanto-Asocio de Britio, 2006.

Le discours sur la langue sous les régimes autoritaires / édité par Patrick Seriot et Andrée Tabouret-Keller. Lau-

sanne : ILSL, Faculté des lettres, Université de Lausanne, 2004. Cahiers de l'ILSL n° 17.

Don Karlos, infanto de Hispanio : drama poemo / Friedrich Schiller ; [el la germana trad. en esperanton Willy Nüesch]. Berno : [Ĉe la trad.], 2006.

Elektitaj poemoj kaj aforismoj / Christian Morgenstern ; [el la germana trad. en esperanton Willy Nüesch]. Berno : [Ĉe la trad.], 2006.

Der Esperantist [Ressource électronique] : 1(1965)-164(1990) / [Detlev Blanke] ; skanita kaj preparita de Helmut Krone. [Berlin] : [D. Blanke], [2006].

Espéranto express : premiers mots utiles, grammaire et phonétique, guide de conversation, renseignements pratiques /



Renée Triolle. Paris : Ed. du Dauphin, 2006. Langue express.

L'extraordinaire diversité des langues et sa répercussion sur l'espéranto / André Cherpillod. Courgenard : Ed. de la Blanchetière, 2006.

La graveco de la fidelejo [Ressource électronique] / Oscar Wilde ; en traduko de William Auld. [Stoke-on-Trent] : Esperanto-Asocio de Britio, 2006.

Interlinguistische Beiträge : zum Wesen und zur Funktion internationaler Plansprachen / Detlev Blanke ; hrsg. von Sabine Fiedler. Frankfurt am Main : P. Lang, 2006.

Pri la kristana amo : encikliko / Benedikto XVI ; el la originalo tradukis Reinhard Haupenthal. [S.l.] : Ed. Ora & labora, 2006.

Reinhard Haupenthal : Bibliographie seiner Veröffentlichungen : Esperantologie, Interlinguistik / bearbeitet von Hervé Vallon ; [Redaktion : Hermann Holzbauer ; Vorwort von Ruprecht Wimmer]. Wiesbaden : Harrassowitz, 2006. Schriften der Universitätsbibliothek Eichstätt Bd 63.

La roma triptiko / Johano Paŭlo la dua ; esperantigis Lidia Ligęza ; [redaktis : Tomasz Chmielik, Kazimierz Leja ; antaŭparola letero de Stanisław Dziwisz ; postparolo de Marek Skwarnicki]. Krakovo ; Czeladź : Hejme, 2006.

Abrégé grammatical et pratique de la langue internationale espéranto : les seize règles du Fundamento, commentaires et analyse / Raymond Gueguen. Limoges : Ed. par l'auteur, 2006.

## Momento kun Luiza (2)<sup>1</sup>

*La 29an de septembro kunvenis en agrabla  
ĉambreto de la restoracio « Fleur de lys » en  
La Chaux-de-Fonds dek-kvar personoj.*

Kial ? Mi scias... kaj mi diros : temis pri renkonto kun Luiza Carol, esperantistino el Izraelio, kiu la tagon mem vizitis CDELI (kaj la morgaŭan tagon vizitos preskaŭ ĉiujn muzeojn de la urbo !).

—ooo—

### **CERMATO**

(senrima akrostiko)

Cervinoj el la arbaro  
Enirantaj la urbeton,  
Roso de mateno  
Malsekiganta miajn okulojn,  
Abia bonodoro,  
Tintilo de preĝejo...  
Oazo de mia vivo.

*Luiza Carol*

—ooo—

### **CERMATO**

(germane : Zermatt)

Cermat', la eta urbo en la Alpmontaro,  
plenigas pulmojn perodoro de abio.  
Cermat', la urbo ĉirkaŭata de arbaro,  
plenigas koron per mildeta nostalgio.

Se tie apud pino mi kelkfoje ploris,  
ĉagrenoj el aliaj lokoj vundis min.  
Nur malproksimajn malfeliĉojn mi memoris,  
dum la urbeto en la neĝo volvis ĝin.

Rompita tempo malaperis sub la neĝo,  
memoroj pri malamo kaj pri krueleco  
fandiĝis kaj ŝanĝiĝis en serena preĝo,  
kovranta pensojn per la blanka trankvileco.

Cermat', la eta urbo en la Alpmontaro,  
plenigas sonĝojn perodoro de abio.  
Cermat', la urbo ĉirkaŭata de arbaro,  
plenigas kanton per mildeta nostalgio.

*Luiza Carol*

—ooo—

<sup>1</sup> Vidu ankaŭ SESi 2/2006, p. 27-28.



Sed ni estas nur hodiaŭ : tiuj do kunvenis por vidi Luizan, esperantistino el fora lando, por paroli kun ŝi kaj por vespermanĝi.

Fakte la interesoj de Luiza estas plej diversaj kaj kun ŝi la konversacioj estis viglaj : pri paco, pri la bedaŭrinda situacio en Mezoriento, pri pedagogio, pri piano, poezio, arto kaj memkompreneble pri esperanto.

Notinde estas, ke ŝi eklernis esperanton antaŭ nur unu jaro kaj duono (kaj ŝi majstras ĝin pli bone ol la hebrean, kiun ŝi lernas jam de 27 jaroj). Tio certe ne mirigos esperantistojn – sed ĉu esperantistoj havus ideojn por sciigi tion al aliuloj ?!

Ankaŭ notinde estas, ke ŝi varbiĝis dank'al artikolo de Claude Piron, kiun ŝi « hazarde »

malkovris en la reto. Temis pri la psikologiaj reagoj koncerne esperanton.

Nu, diversmaniere mi certas, ke ĉiuj vespermanĝis. Plej probable ankaŭ ĉiuj vidis Luizan. Sed bedaŭrinde – pro tio ke ŝi havas malstentoran voĉon (neniu vidu en tio mal-kvaliton !) kaj ankaŭ pro tio ke la esperantistoj abundis (ni ja scias ke nenio abundas pli ol esperantistoj !), mi ne estas certa, ke ĉiuj povis bone ŝin aŭdi.

Esperable tamen ĉiuj povis agrable paroli kun siaj najbaroj kaj havi plezuron en tiu renkontiĝo. Kaj, plenumota promeso : venontan fojon venos samtempe kiel la gasto... mikrofono !

*(Umu el la dek-kvar)*

## SAT fronte al financa krizo

*Pli multnombre partoprenita ol la pasintjara estis la SAT-kongreso en Beogrado (19a ĝis 26a de aŭgusto 2006) kun 150 kongresanoj el pli ol 20 landoj.*

### • Gary Mickle

Organizis la kongreson OKK prezidita de Tereza Kapista. Neevitebla laborkunsida temo estis la jam kriznivela financproblemo de SAT. En la Gvidrezolucio la kunvenintaj membroj esprimas sian fidon al la Plenumkomitato por solvi la financan krizon laŭ la plej bona maniero samtempe por SAT kaj por Kreŝimir Barkoviĉ, kiu okaze de maldungo ricevu la diferencon inter sia antaŭa salajro kaj la ŝtata senlaborula kompenso. Vendon de la sidejo oni ne ekskludas. Malgraŭ ŝanĝiĝontaj kondiĉoj en la sidejo, la kongresanoj projektis estontan agadon. Interalie oni ekzamenis proponon pri eldonkooperativo. Unu laborkunsidon plenigis debatoj pri socipolitikaj temoj : la situacio en Mezoriento, la protestmovado kontraŭ la unuadunga kontrakto en Francio, naciismo kaj edukado en Japanio kaj aliaj landoj, kaj la politika flanko de Esperanto-informado : tio, ĉu la SAT-medio prezentu Esperanton samstile kiel la « neŭtrala ». Kunveno gvidita de Colette kaj André Weiss pritraktis la problemon de la grapolbomboj – kiuj entenas « grapolon » de pli malgrandaj bomboj kaj ilin disvastigas en ampleksa areo. Nova kampanjo kontraŭ tiuj

armiloj sekvas antaŭajn agadojn de la du aktivuloj kiel la kontraŭmina kampanjo. SAT petos aliĝon al la Monda Koalicio kontraŭ tiuj armiloj.

Kunvenis la frakcioj liberpensula, komunista, ĉielarka, sennaciisma, kaj ekologiista, kaj la Poresperanta Fako. Revigliĝis la porpaca frakcio. En la kultura programo figuris i. a. teatraj prezentoj de Vida Jerman kaj Jerzy Fornal kaj koncerto de la filharmonio de gejunuloj el Beogrado.

La kongresa Deklaracio kontraŭas ŝtatan kaj ne-ŝtatan terorismen kaj postulas liberigon de la malliberigitaj de la usonaj koncentrejoj en Guantanamo kaj aliaj lokoj. Por la Mezoriento ĝi alvokas prepari kondiĉojn de longdaŭra paco per historia klerigado kaj disvolvo de interfratiĝaj rilatoj. Pri tio estis debato kaj disopinieco. Preskaŭ duono de la voĉdonantoj preferis aŭ proponon, ke UN altrudu tujan fondon de palestina ŝtato, aŭ pledon por la t. n. « unuŝtata solvo » sur la historia teritorio de Palestino.

*(El « La Ondo de Esperanto », 10/2006)*

## Sindikatoj unuiĝas mondscale

Fondkongreso de Internacia sindikata federacio okazis en Vieno de la 1a ĝis la 3a de novembro 2006. Sindikatoj konsciiĝis ke la ekonomia tutmondiĝo postulas mondscale agadon por defendi la rajtojn de la salajruloj kaj paroli per unu voĉo dum intertraktoj kun




multnaciaj entreprenoj, la Monda banko, la Internacia monda fonduso aŭ la Monda organizo pri komerco. Antaŭ presado de « SES informas » la decidoj de la konferenco ne estas ankoraŭ konataj, sed jen eltiraĵo el la projekto : Artikolo 6 – Oficialaj lingvoj :

a) La oficialaj lingvoj de la kongreso estos la angla, la franca, la germana kaj la hispana.

b) La kongreso povas decidi adopton de aliaj laborlingvoj [do, ĉu ebla loko por esperanto ?]

c) Ĉiu delegit(in)o deziranta esprimiĝi en ĉiu ajn alia lingvo devas mem havigi tradukon de sia parolado en unu el la oficialaj lingvoj.

## Plena Ilustrita Vortaro 2005



PIV estas la plej ampleksa kaj plej kompleta unulingva vortaro de Esperanto, nemalhavebla ilo por ĉiuj homoj, kiuj serioze okupiĝas pri Esperanto, pri verkado, pri literaturo, pri scienco. Ĝi elkreskis el la Plena

Vortaro. Ĝia unua eldono el la jaro 1970 ampleksis XXXVII + 1300 paĝojn. Dek unu jarojn poste, en la jubilea jaro de Esperanto, aperis la Suplemento al PIV, kiu kolektis la novajn vortojn, kiuj enuziĝis en tiu tempo.

PIV enhavas ankaŭ nomojn de urboj kaj de personoj, ĝi enhavas fakterminojn kaj neologismojn, slangaĵojn kaj parolan uzon. Kaj ne laste: ĝi donas amason da uzekzemploj, ĉerpitaj el la verkoj de la grandaj verkistoj de Esperanto. Ĝi do povas servi kiel malgranda enciklopedio.

PIV estas forte bindita kun la ilustraĵoj en la teksto. Formato : 24,5 × 15,5 cm. Paĝoj : 1265. Prezo: 80 € (+ reg. afranko).

Mendo de PIV 2005, sed ankaŭ de PIV 2003 (malpli aktuala kaj ne senerarigita, sed malpli kosta) ĉe la sekvaj libroservoj :



Allsprachendienst Esperanto GmbH  
Esperanto-Librejo Zuriko  
Akazienstrasse 6, Postfach 858  
8034 Zürich  
Tel. 01 251 50 25, faksilo 01 261 04 79  
info@esperanto.ch

Kultura Centro Esperantista  
Strato Postiers 27, Poŝtfako 311  
2301 La Chaux-de-Fonds  
Tel. k faksilo 032 926 74 07  
kce@esperantio.net

Libroservo de CDELI  
Bibliothèque de la Ville  
Case postale 3034  
2303 La Chaux-de-Fonds  
Tel. 032 967 68 55  
claude.gacond@ne.ch

—ooo—

*Sube : Claude Piron prelegas en Uni Mail en Ĝenevo pri «Comment se comprendre ? : la angla, globish, esperanto» (fotis E. Chibleur).*





Tiu blueca nebulo, nefiksita pejzaĝo, nevidebla mondo,  
sur ĝi mi scemas tiujn kelkajn literojn, flosantaj literoj en la malpleno.

Aprilaj arboj ilin rigardas.

Uloj mallaudas tiun nebulon, same kiel la akvan neĝon,  
la falantan pluvon, kaj tiun froston.

Sed belegas, la arbaro konservas sian intimon dank'al tiu nedifina vualo, kaj nur pli  
subtilajn kolorojn. Kiom mi ŝatas marsi inter la arboj, miaj forliberaj vankoj.

Mi sidigas sur lignaĵon kaj ŝipozas, pensas, observas.

Amikino alvenante sur la vojeto kaj sidigante kontraŭ mi. Mi imagas mian dolcan  
Pluvo audigas en la

foliaro kaj subite guto frapas mian kapon kaj vekas min. Mi daurigas kaj admiras tordajn  
Silueto, malordinara kontrasto,

Vivo!  
Artaĵo de naturo

Ĉiam sur tiu fundo el blankeca nenio. Kaj neniu. Neniu promenas

sur la vojeto el akviganta neĝo. Estas nur la arboj,  
la pluvo kaj mi.

Kaj la arboj, la pluvo kaj mi unuigas  
Luko